

Esperantista teamo gajnis la unuan lokon en tradukado de “VKontakte”



La rusia socia reto «VKontakte» estas tradukata al aliaj lingvoj ekde la jaro 2008, kiam aperis la unua alilingva versio — la ukraina. Kaj ekde la 2013-a jaro oni povas ĝui la Esperantan interfacon de VK. Kiu faras tiun laboron? Kiel ĝi estas organizata? Kion signifas esti gajninta teamo el inter ĉiuj teamoj de tradukistoj?

Al tiuj kaj aliaj demandoj Irina Gončarova petis respondi al Aleksandr Osipov, unu el membroj de la esperantista tradukteamo, 18-jara programisto, studento de Altaja ŝtata universitato, membro de Barnaula Esperanto-klubo “Oazo”. Aleksandro eklernis Esperanton memstare en 2015, ĉar, kiel li diras, “volis etendi lingvajn sciojn kaj ekkoni novajn homojn”.

1/ Kial bezonatas traduki VK en Esperanton?

Kiel oni scias, VK pleje estas populara en postsovetiaj landoj, kie oni kutime uzas la rusan lingvon por internacia komunikaĵo. Tamen, ni ne neglektu ankaŭ homojn el aliaj landoj, kiuj la rusan ne scias aŭ scias tro malbone. Por oportuni VK-on por tiuj homoj estas retejaj tradukoj en multaj lingvoj, inkluzive Esperanton.

La celo de nia traduko estas ebligi uzadon de la retejo al esperantistoj el la tuta mondo, do ili povos konatiĝi kun postsovetiaj esperantistoj aŭ uzi VK-on kiel aldonan platformon por komunikiĝo kaj disvastigo de Esperanto.

2/ Kiu lanĉis tiun laboron kaj kiam?

Mi eĉ ne scias. La malnova tradukista teamo, kiu lanĉis la tradukadon, nun estas disiĝinta, sed iuj ĝiaj anoj daŭre laboras super tradukoj de VK al aliaj lingvoj. Malnovaj tradukitaj ŝlosiloj (ŝlosilo: tradukebla ero da teksto – *red.*) de VK igas supozi, ke la laboro ekis proksimume en la jaro 2013.

3/ Kial kaj kiam vi ekokupiĝis pri tio?


Mi mem eklaboris super la traduko en la jaro 2016. Tiam mi estis lerninta Esperanton dum unu jaro, tamen sentis min sufiĉe memfida por surprizi tiajn projektojn.

4/ Kun kiu vi kunlaboras kaj kial ĝuste kun tiu(j) homo(j)? Kio estas via laboro kaj kunlaboro? Kiel estas distribuata la laboro inter la kunlaborantoj?

La nuna teamo konsistas el 3 homoj: mi, Denis Bron (u. Siktivkaro) kaj nia estro Kirill Noviĉenko (u. Sankt-Peterburgo). Ĉiu el ni trovas netradukitajn ŝlosilojn aŭ tradukitajn malkorekte, kaj (re)tradukas ilin. Estas neniu distribuo de la laboro, ĉar tio fakte estas tro simpla laboro por distribui ĝin. Tamen mi aŭdacas diri, ke mi iam laboras kiel kvaliprovisto, ĉar mi ofte korektas erarojn de aliaj tradukistoj.

5/ Kio nome estas tradukata?

Ĉio. Eĉ tio, kion ordinara uzanto apenaŭ povas vidi. Kompreneble, estas iom da ŝlosiloj, kiujn ni ne rajtas traduki. Tio ĉefe estas io tro loka (por uzantoj de konkreta lingvo).



6/ Kiel estas organizata la laboro?

La retejo havas specialan interfacon por tradukistoj. Tie oni povas vidi ĉiujn ŝlosilojn, serĉi certajn el ili kaj, kompreneble, traduki ilin. Tiu interfaceto estas sufiĉe oportuna kaj havas multe da utilaj funkcioj. Ekzemple, eblon vidi ŝlosilajn variantojn en la rusa, la angla kaj eĉ alia dezirata lingvo, kio helpas pliiĝigi la tradukojn. Tamen estas ankaŭ iom da malpotunaĵoj en la interfaceto, sed tio estas temo ne por ĉi-intervuo.

La retejaj dezajnistoj antaŭnelonge aldonis ankaŭ specialan glosaron, kie ni povas formi unuecan terminaron. Tio estas grava, ĉar ĉiu tradukisto havas sian propran opinion, kiel iuj aferoj devas esti tradukataj, kio malbonigas la tradukon kaj povas eĉ konfuzi iun.

7/ Kiom da tempo vi elspezas por ĝi?

Iutempe mi ne vizitas la interfacon dum tagoj, iutempe mi senhalte pasigas horojn, laborante super la traduko. Mi havas ankaŭ aliajn aferojn, finfine.

8/ Ĉu la laboro iam estos finita? Kial?

Ĝi neniam finiĝos, ĉar VK konstante aldonas novajn funkciojn kaj sekciojn, kiujn ni devas traduki. Eĉ pli, eĉ ne ĉiuj kurantaj ŝlosiloj ankoraŭ estas tradukitaj, do ni havas multe da aldona laboro, por kiu bezonatas monatoj.

9/ Ĉu ekzistas iuj laborplanoj, limdatoj, devigoj pri kvanto da tradukeroj? Kiu zorgas pri plenumo de la taskoj?

La kvanto da netradukitaj ŝlosiloj kaj ilia elcento ĉiam estas videblaj por ni. Ni ne havas certajn planojn aŭ limdatojn, tamen iam la tradukista fako de VK donas al ni certajn taskojn pri tradukado aŭ provado de novaj tekstoj. Estas grave ne paŭzi tro longe: tiukaze la traduko fermiĝos pro tro malmulta tradukiteca elcento.

10/ Kiun nivelon de Esperanto devas posedi la tradukanto?

Por iĝi tradukanto oni povas havi eĉ malaltan E-nivelon, ĉar multe da tradukendaj tekstoj estas pri simplaj kaj kutimaj aferoj. Io pli ol komencanto jam estos sufiĉa por simplaj taskoj. Pli utila ol scio de la lingvo ofte estas scio de terminoj el certaj fakoj, specife el komputiko, ĉar ili ofte estas uzataj en la retejaj tekstoj.

11/ Ĉu vi ŝatas la laboron? Kion vi mem ricevas de ĝi?

Kompreneble, jes! Mi ne okupiĝas pri tiaj aferoj, se mi ne ŝatus ilin. Kaj krom la ĝojo, mi ankaŭ ricevas salajron el voĉoj (ena valuto de VK). Tio eble estos signifa bonaĵo por tiuj, kiuj ofte aĉetas gluetikedojn kaj donacojn en VK aŭ aldonan valuton en VK-aj videoludoj.

12/ Kiom longe vi jam okupiĝas pri tiu ĉi laboro kaj kiom longe vi intencas daŭrigi?

Mi estas en la tradukista teamo jam dum 4 jaroj kaj mi ne planas lasi ĝin.

13/ Komparu masivon de E-tradukoj kun aliaj lingvoj.

Mi ne havas datumojn pri aliaj lingvoj, tamen mi pensas, ke el ĉiuj neprioritataj lingvoj de VK, Esperanto devas havi decan plenumitecon. Mi jam diris pri granda kvanto da netradukitaj ŝlosiloj, sed tio estas nur demando pri tempo. En aprilo (kaj eble majo, ni ankoraŭ ne scias) nia teamo havis la plej altan produktivecon el ĉiuj aliaj teamoj, kaj se ni konservos ĝin, ni rapide proksimiĝos al 100%-a plenumiteco.

14/ Vi ĵus atingis la unuan lokon — klarigu, kio tio estas?



La tradukista fakoj de VK komparas kvantojn da ŝlosiloj, tradukitaj dum la pasinta monato, en ĉiu alilingva traduko de VK kaj publikigas rezultan enskribon en la fermita grupo por tradukistoj. Tri teamoj kun la plej bona produktiveco por la monato estas menciataj en ĉi-enskribo. Kaj, kiel mi diris, en aprilo nia teamo ne nur trafis en ĉi-enskribon, sed eĉ atingis la unuan lokon. Tio estis plena surprizo por mi.

15/ Ĉu vi kontentas pri rezultoj de via laboro?

Mi pensas, ke jes. Lastatempe ni faris tiel grandan laboron, ke la plej multaj sekcioj de la retejo nun preskaŭ ne havas netradukitajn lokojn. Restis ankoraŭ iom da laboro, tamen mi kredas, ke ni plenumos ĝin rapide.

16/ Ĉu vi sentas bezonon havi kromajn kunlaborantojn? Ĉu vi deziras inviti ilin kaj instrui labori?

Ni tri bone faras nian laboron, sed aldonaj manoj (kaj cerboj) ne estus senbezonaĵo. Se iu deziras aliĝi al ni, ni rapide instruos rin pri nia laborado. Turnu vin al Kirill Noviĉenko: — <http://vk.com/id672004>

	Denis Bron Russian → Esperanto	696 / 106 ●●●
		Tradukoj
	Alexander Osipov Russian → Esperanto	689 / 139 ●●●
		Tradukoj

Komento por la tabelo:

Statistiko de aprilo (kiam estis atingita la unua loko): novaj kreitaj ŝlosiloj / malnovaj redaktitaj ŝlosiloj.

Denis/Aleksandr: pri novaj ŝlosiloj: 50.3% / 49.7%; pri redaktitaj malnovaj ŝlosiloj: 43.3% / 56.7%

Egalan kontribuon al la aprilaj traduk-atingoj de VK faris la 18-jara Denis Bron el Siktivkaro, studanta nun en Ŝtata Universitato de la Mara kaj Rivera Floto (Sankt-Peterburgo). Li eklernis Esperanton antaŭ unu jaro. Li diras: "Mi trovis en interreto informon pri tiu lingvo kaj inspiriĝis pro ĝia ideo de amikeco kaj

komuneco. Mi okupiĝas pri tradukado de VK, ĉar volas kontribui al komuna afero kaj plibonigi mian Esperanton ne nur per bablado, sed ankaŭ per tradukado el aliaj lingvoj. La tradukado helpas al mi eĉ pli rapide pensi en Esperanto".



Lingvaj festivaloj

Ĉu lingvaj festivaloj restos virtualaj?

Sperto pri virtuala prezentado de Esperanto dum la VIII Lingva Festivalo en Permĵ

30.05.2020, sabato

<https://vk.com/permlfest>

La 8a Permĵa Lingva Festivalo estis vera festo, espereble, ne nur por la lingvoprezentantoj, sed ankaŭ por la gastoj. La reagoj, kiel ĉiam estis ravaj.

Iom da festivala statistiko. 35 prezentantoj prelegis en 5 virtualaj ĉambroj en 7 blokoj po 50 minutoj. La plej granda kvanto da gastoj en unu bloko estis 124.

Mi rakontis pri Esperanto en la plej vizitata 5a bloko. En la "ĉambro" dum mia elpaŝo estis 28 gastoj. Kelkaj el ili certe estis esperantorilataj, ĉar antaŭ la prelego iuj subtenis min, skribinte "Saluton!"

Estas por mi nova sperto prezenti Esperanton virtuale dum lingva festivalo. Iom strangas ne senti reagojn de la publiko (por eviti trolojn eĉ la babilejo estas videbla nur por la moderiganto).

Mi uzis tute alian prezentaĵon ol kutime. Tio estis surekranaj bildoj kun buŝaj komentoj.

